

Jara abonprezo

30,- GM

P&k. Nürnberg
819 56 - 851

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pikel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 14/1974 16 aprilo 1974
Aperas ĉiusemajne

Varsovio trifoje ĉiutage

Varsovio (pp) Dum la dimanĉa/lunda Esperanto-Ekspreso la Esperanto-redakcio de Pola Radio por Eksterlando anoncis, ke ekde la 6a de majo 1974 la Esperanto-elsendoj el Varsovio okazos trifoje tage. La nova, tria elsendo estos disaŭdigata je la 22,30 horo sur la ondoj 49 m kaj 200 m. Baldaŭ la aŭskultantoj ricevos novan informfolion por la somera programo.

Ekde la 6a de majo okazos do E-aj elsendoj je la 6a horo, je la 16,30 horo kaj je la 22,30 horo.

Tiu ĝojiga informo fakte estas surpriza novaĵo kaj bela naskiĝtaga donaco al la 15jara redakcio. En telefona interparolo Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA, nomis la informon sensacio. Certe li pravus! Sed sen la konstanta aktiva kunlaborado inter la aŭskultantoj kaj la redakcio tiu sensacio ne estus realiĝinta. Al tiu sukceso ankaŭ kontribuis kelkaj Esperanto-gazetoj, kiuj ekkonis la gravecon de Esperanto en la radia medio kaj dediĉis al ĝi atenton.

Sed dependas nun de la internacia kolektivo de Esperanto-uzantoj, kiuj ebligis tiun sukceson, ke el la sensacio fariĝu ĉiutageĵo: Aŭskultu, skribu kaj komentu la elsendojn!

Skribu al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, POB 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

Informfolio de Radio Berno

Berno (pp) La Svisa Kurtonda Servo ĝis nun eldonis komunan informkajeron por ĉiuj eksterlandaj elsendoj. Sub la dato de la 20 marto 1974 la radio-stacio nun informas, ke estonte oni planas eldoni por ĉiu ĉefa lingvo apartan programkajeron. Por Esperanto oni antaŭvidas apartan informfolion. La aŭskultantoj estas petataj sciigi al la radiostacio kiun programkajeron ili deziras ricevi. Esperantistoj povas peti la informfolion.

Skribu al: Svisa Kurtonda Servo, CH-3000 Bern 15, Svislando

Radio-elsendo pri Esperanto en kataluna lingvo

Perpignan (a.vid/pp) O.R.T.F., radio kaj televido franca, komisiis s-ron René Llech-Walter per la tasko organizi ĉiu-monate du elsendojn en kataluna lingvo ĉe la stacio de Perpignan-Roussillon. Unu el la aprila elsendo temis pri Esperanto, dum kiu estis deklamita poemo de kataluna poeto "Ni sekvu la verdan stelon". La elsendo daŭris 15 minutojn.

BBC pri Esperanto

Londono (pp) La germana sekcio de la Brita Radio disaŭdigis komence de marto pozitivan elsendon pri Esperanto en germana lingvo. Ĝi temis pri la rilatoj de la mortinta Nikolai Rytjkov al Esperanto.

Das Streiflicht

(SZ) Warum nur greifen wir alte Gymnasisten mit neun Jahren Latein, sobald wir das abiturum hinter uns haben, nie wieder zum Tacitus, zum Horaz, zum Virgil oder — bitte sehr, wenn es was leichteres sein soll — nicht wenigstens zum Catull oder zum Ovid? Wir könnten es ja schon, doch wir wollen es nicht. Oder wollen wir es bloß nicht mehr? Anscheinend lernt sich Latein eben doch für die Schule und weniger fürs Leben. Wenn man es gründlicher überdenkt, fehlt es an der sogenannten Motivation, unseren Sprachschatz durch Übung wertbeständig zu halten.

Das könnte sich jetzt rasch ändern. Zwei niederländische Abgeordnete haben der Kommission der Europäischen Gemeinschaft vorgeschlagen, das Latein zur Amtssprache der EG-Europäer zu machen und es vor allem an höheren Schulen als erste Fremdsprache zu lehren. Unsere politischen Streitdebatten ließen sich also in absehbarer Zeit auf lateinisch austragen, so daß der nationalistische Streit um, den Vorrang des Englischen oder Französischen schon gleich einmal hinfällig würde. Der Gedanke ist allein deshalb bestechend, weil die weniger gebildeten Schichten aus der Grundschule schon wegen Sprachschwierigkeiten den Reden in Brüssel künftig überhaupt nicht mehr zu folgen brauchten. Auch wären alle Europäer durch die lateinische Grammatik umgehend Freunde: bekanntlich duzten die Römer, mangels einer anderen Anredeform, sogar ihren Kaiser. Latein schult das logische Denkvermögen, schärft die Genauigkeit im Ausdruck, bildete seinerzeit das Gefühl nicht nur für Stil, sondern auch für politische Zusammengehörigkeit — lauter Dinge also, die wir Europäer heute dringend brauchen können. Halt, müssen wir hier den holländischen Freunden zurufen: sapiens nihil affirmat quod non probet. Das römische Europa nämlich hielten weit stärkere Bande zusammen als nur gemeinsame Sprache. Die Gesinnungseinheit römischer Bürger aus allen Völkern war ja erst die Voraussetzung für den säkularen Siegeszug des Lateins. Mit dem Verfall römischer Gesinnung verringerte eben auch das Latein sich zum Verständigungsmittel einer Glaubens- und später einer Bildungsgemeinschaft. Wo aber ist heute Europas gemeinsame Gesinnung? Schon der Schöpfer des Esperanto, der polnische Augenarzt Zamenhof, hat hier den Unterschied zwischen Wirkung und Ursache nicht ganz klar gesehen.

Auf die Dauer wird ohne gemeinschaftliche Seele eine gemeinschaftliche Sprache eben doch nicht leben können. Warum nur wäre es sonst Südafrikanern und Israeli geglückt, aus alten Sprachen eine neue zu schaffen? Wir indessen werden unseren Söhnen weiter gut zurechnen, das Latein als geschichtliches Beispiel für die Möglichkeiten einer großen Sprache nicht geringzuzachten: in der Gesinnung, in der Literatur, in der Politik. Echte Muttersprache ist es ohnehin immer nur vergleichsweise wenigen Europäern gewesen. Hört auf, wozu so viele Umstände, nicht uns da selbst Virgil aus dem Jenseits zu: *Claudite jam rivos, pueri. Sat prata biberunt.*

Beatles-spekulacio

Nun ankaŭ germanaj revuoj skribas pri la ladaira intenco de Beatles helpi al Esperanto kaj la sporto, speciale la Olimpiaj Ludoj. Pilo-Press jam raportis pri tiu ne tre versaĵna informo, kiu ŝajne trairis la tutan mondon.

Nederlanda lingvopropono

Nürnberg (pp) En germanaj gazetoj oni povis legi lasttempe pri la propono de du nederlandaj parlamentanoj al la Komisiono de la Eŭropa Komuno (EK), ke la latina lingvo fariĝu la lingvo de la EK, provizore en la simpligita formo de la "kuireja latino". La nederlandaj parlamentanoj ankaŭ postulas, ke latino estu instruata kiel unua fremdlingvo en ĉiuj lernejoj.

Ankaŭ "Süddeutsche Zeitung", München, ekprenis tiun informon kaj publikigis apudan komentaron (17.4.74). El ĝi ni citas kelkajn frazojn:

"... Sed kie hodiaŭ estas la komuna idearo de Eŭropo? Jam la kreinto de Esperanto, la pola okulkuracisto Zamenhof, ne tute klare ekkonis la diferencon inter efiko kaj kaŭzo.

En la daŭro komuna lingvo certe ne povos vivi sen komuna animo..."

LEUTE VON HEUTE

PERSONALIEN



Paul McCartney, John Lennon, Ringo Starr und George Harrison, kurzum die Beatles (hier auf einem Jugendfoto), wollen wieder gemeinsam ein Konzert geben. Termin: 1. Juli 1974; Ort: Montreal in Kanada; Sinn: Förderung des Sports und der internationalen Kunstsprache Esperanto. Von der Wohltätigkeitsveranstaltung soll jeder Sportler, der 1976 an den Olympischen Spielen

in Montreal teilnimmt, 1000 Dollar erhalten. Zusätzliche 2000 Dollar bekommt er, wenn er bereit ist, Esperanto zu lernen. Die Beatles möchten, daß Esperanto die offizielle Sprache bei den Spielen wird. Zwar wird der Eintritt zum Konzert frei sein, doch erhoffen sich die Beatles zehn Millionen Dollar aus den Weltrechten für Film, Fernsehen, Schallplatte und Kassette.

Dua Esperanto-Intensivkurso en universitato

Bochum (hmm) Sukcese finiĝis la dua Esperanto-intensivkurso en la universitato de Bochum, kiu okazis de la 8 - 11 aprilo sub gvido de d-ro Hans Michael Maitzen kaj asisto de d-ro Hans J. Schober kun partopreno de 11 personoj.

"Kiel oni dum tiom mallonga tempo entute ion povas lerni de la lingvo?" estis la miroplena demando de membroj de la "Zentrales Fremdspracheninstitut" (Centra Fremdlingva Instituto), kiu afable disponigis por tiu kurso (la 7a en vico de similaj kursoj en Nord-rejn-Vestfalia, organizita de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj) unu el siaj lingvolaborejoj. Jes, oni povis, ĉar la partoprenintoj akiris dum tiu ekstreme eta tempo firman bazon pere de la kursverko de la famkonata Esperanto-instruisto kaj aktivulo Hermann Behrmann, laŭ kies sonbendaro kaj tekstoj oni instruis resp. studis. Refoje montriĝis la apenaŭ taksebla avantaĝo de la moderna lingvolaboreja metodo kontraste al la arkaika perado de Esperanto en unu-komo-kvin-horoj-po-semajno-kursoj, kie oni bezonas la duonon de la tempo por refreŝigi kaj retrovigi la forgesitan dum unu semajno instrumaterialon. En intensivkurso la studento estas ĉirkaŭata konstante de la nova lingva medio, li krome kunvivas kun la aliaj gekursanoj kun multe malpli da izoliteco ol kutime. Ĉe la fino el la partoprenintoj unu diris: "Estas speco de dolorsento en ni, se ni nun vidas, ke la kurso finiĝas!"

Ŝajnas, ke tiu nova kursformo devus trovi aplikon ankaŭ en aliaj landoj, kaj se eble, en universitatoj. Necesas nur mendi kopion de la 69 sonbendoj (po 15 minutoj da registraĵo) kaj la tekstlibrojn koncernajn. La rolo de lingvolaboreja instruisto estas facile lernebla. Ĝojiga informo tiurilate: Profesoro Augusto Ochoa el Kolombio, kiu esplorcele restadas unu jaron en Eŭropo kaj kies edzino partoprenis la kurson (li jam estas esperantisto), deklaris, ke li intencas enkonduki la metodon en sia universitato, ĉar li taksas ĝin kiel plej adekvatan.

La serio de Esperanto-intensivkursoj surbaze de la ĝisnunaj rezultoj kaj sukcesoj estos daŭrigata per plia kurso en somero ĉi jare.

Enketo pri lingvopolitikaj demandoj

Paderborn. La Instituto pri Cibernetiko en Berlino kaj Paderborn, FRG, kies direktoro estas prof. d-ro Frank, fine de marto 1974 sendis enketilon al pli ol 4000 reprezentantoj el scienco, fremdlingva instruado, politiko, administrado, ekonomio kaj aliaj popolgrupoj. Temas pri diversaj lingvopolitikaj demandoj.

El la ĝis nun alvenintaj respondoj 98 % estas konvinkitaj, ke almenaŭ ĉiu dua germano malsuperas sian anglan fakon kolegon en ŝtanta unuigita Eŭropo malgraŭ 1500-hora fremdlingva instruado; 80 % kredas, ke tio validas eĉ por tri kvaronoj de la germanoj. 53 % pensas, ke nur malpli ol 5 % el ĉiuj germanoj atingas ŝancegalecon kun la angloj. 76 % postulas la egalrajtecon de ĉiuj EK-lingvoj; 80 % postulas almenaŭ la egalrajtecon de la germana kaj franca lingvoj.

Tiu postulata egalrajteco de la sep EK-lingvoj fakte estas atingebla nur per neŭtrala planlingvo, ekz-e Esperanto. 76 % postulas, ke rondo de ekspertoj prezentu ĝis 1976 ekspertizon pri la ekzistantaj planlingvoj. Tre rimarkinde estas, ke pli ol 90 % ŝatus, ke la internaciaj fakrevuoj uzu facile lerneblan planlingvon por la resumoj de la artikoloj kaj ke tiu grupo estas preta akiri pasivan scipovon en la planlingvo per 20-hora lern-investado. 86 % kredas, ke helpe de

Enketo pri lingvopolitikaj demandoj (daŭrigo)

programita instruado tia planlingvo povus enkondukiĝi en FRG same rapide kiel antaŭ kelkaj jaroj la nova matematiko (teorio pri ensembloj).

Tiuj ĉi neatenditaj respondoj povos ludi gravan rolon ĉe la konceptigo de lingvopolitika programo. Sed de kiu el la tri grandaj partioj en FRG venos la unua iniciato, tion duono de la respondintoj ne scias prognozi; 23 % atendas la iniciaton de la liberala partio (FDP), 16 % de la socialdemokrata (SPD) kaj 11 % de la konservativa (CDU/CSU).

Elgermanigis Hermann Behrmann

Nova radioamatoro

Bamberg (lr) Nova radioamatoro en la distrikto de Bamberg estas la esperantisto Kurt Daum. Krom la angla lingvo li ankaŭ uzas la internacian lingvon Esperanto. Li estas atingebla sur la 2-metra amatora bendo kaj aŭdebla eble ankaŭ en najbaraj landoj. Provu lin voki! Lia stacio: 144 MHz mobil-portebla (tio signifas portebla stacio uzebla ankaŭ en aŭtomobilo). Voksigno: DB 7 ND, DARC-distrikto Bamberg: DOK B05
Lia adreso: Kurt Daum, Am Höhenweg 1, D-8602 Stegaurach,
Tel. 0951 - 29541

Esperanto ĉe Rotary

Parizo (av) Paul Maugras, guberniestro de la 170a distrikto, 1, Boulevard Jean Jaurès, F-3000 Nîmes, skribis al UFE, Parizo por peti liston da prelegantoj kiuj povus prelegi pri Esperanto en 50 Rotary-Kluboĵ de Suda parto de Francujo.

UFE transdonis la peton al Federacio Langvedoko-Rusijono, kies prezidanto Illech-Walter informis la guberniestron de Rotary, ke 6 esperantistoj el diversaj urboj de Sudfrancio estas pretaj prelegi.

Anonima reago

El Okcidenta Berlino atingis Pilo-Press-on poŝtkarto kun jena enhavo:

Pri Pilo-Press Nr. 9/1974 1.3.74 paĝo 2
Nr. 11/1974 15.3.74 paĝo 3

Radio Bervalio respondis banale!
Radio Internaciokulôtoto korektas:

Skoltoj, malegoisme aspiras al Esperantujo - internacia

Sportistoj, sur tribunoj flagsvingante,
jubilas ĉirkaŭ "origaj herooĵ" - nacia

Esperantanoj ne estas sport-kapitalistoj!!! Kòpio libere

Kronach. Komence de la jaro la "Sparkasse Kronach" sendis al la lokaj lernejoj la konatan florkalendaron en germana kaj Esperanta lingvoj. Sur la suba parto estas presita "Sparkasse Kronach".

Kronach valoras vojaĝon! Partoprenu la postkongreson!